
www.slovakia.travel



# Slovakio

Slovakio

Video Slovakio






# Slovakio

**Ekestodato:** la 1-an de januaro 1993
**Areo:** 49 035 km²
**Loĝantaro:** 5 408 148
(je la 30-a de septembro 2012)

**Ĉefurbo:** Bratislavo (Bratislava)
**Nacia lingvo:** la slovaka
**Valuto:** eŭro
(ekde la 1-a de januaro 2009)

**Najbaraj landoj:** Hungario (655 km), Pollando (541 km), Ĉeĥio (252 km), Aŭstrio (107 km), Ukrainio (98 km)

**Horzono:** mezeŭropa tempo (GMT+1 horo), somera tempo (marto-novembro: GMT+2 horoj)

**Distancoj:**
Bratislavo – Vieno / Flughaveno Schwechat: 80 km/60 km
– Budapeŝto/Flughaveno: 200 km/218 km
– Banská Bystrica: 210 km
– Košice: 400 km
– Poprad: 332 km
– Žilina: 202 km
Košice – Budapeŝta flughaveno: 268 km
– Poprad: 118 km
Poprad – Krakova flughaveno: 156 km

## Kulturaj plejoj...

La plej ampleksa mezepoka fortikaĵa komplekso en centra Eŭropo: **la burgo Spišský hrad.**

La plej orienta okcidentstila katedralo en Eŭropo: la gotika **katedralo de sankta Elizabeto en Košice.**

La plej alta ligna altaro en la mondo: **en la preĝejo de sankta Jakobo en Levoča** (18,6 m).

La plej malnova mina universitato en Eŭropo: **la mina akademio en Banská Štiavnica** (1763).

La plej malnova daŭre funkcianta entrepreno: **la monfarejo en Kremnica** (ekde 1328).

## Naturaj plejoj...

Unu el la plej grandaj travertinaj formaĵoj en la mondo: la stalagmito **Kvapeľ rožňavských jaskyniarov** (la groto Krásnohorská jaskyňa, 32,6 m alta, kun 12 m diametra bazo).

La plej granda rivera insulo en Eŭropo: **Žitný ostrov** (132 612 ha), kiu estas ankaŭ la plej granda rezervejo de trinkakvo.

La sola aragonita groto en Eŭropo: **Ochtinská aragonitová jaskyňa** (en la karsta regiono Slovenský kras).

La sola malvarmakva gejsero en Slovakio kaj raraĵo en Eŭropo: **la gejsero en Herľany** (ŝpruciganta akvon ĝis 15–20 m alten).



Roháče – Západné Tatry

# Slovakio. Amikeca lando.

Slovakio estas unika lando, ĉar en sufiĉe malgranda teritorio vi povas trovi preskaŭ ĉion, de naturaj mirindaĵoj, historiaj monumentoj, riĉa popolkulturo kaj folkloro, ĝis amuziĝo en homplenaj stratoj. Lasu vin ravi de ĝiaj belaĵoj kaj ĝuu la unikan etoson, kiun vi trovos tie. Vi malkovros logaĵojn de naturaj pejzaĝoj, kune kun riĉaj historio, kulturo kaj tradicioj. Malkovru Slovakion, la Etan Grandan Landon.

Venu vidi mem la riĉan naturan diversecon viglan per senbrida libereco, la elegantecon de profundaj valoj gardataj de majestaj montopintoj kun kristale klaraj riveretoj. Ĝuu la maloftan eblon ekkoni pentrindajn historiajn urbojn kaj impresajn mond-heredaĵajn monumentojn. Gustumu la apartajn aromojn de regionaj specialaĵoj kaj de tradicia nacia kuirarto.

Ĉi tio estas nur kelkaj linioj el la fascina romano, kies aŭtoro estas la slovakia naturo mem, kaj el la historio, kulturo kaj tradicioj de la slovaka nacio. Do se vi volas malkovri pliajn unikajn vidindaĵojn kaj pasigi vian liberan tempon ĝuante multajn ĝojigajn kaj memorindajn spertojn, konsideru tiujn kelkajn liniojn persona invito.

Inspiriĝu kaj vizitu lokojn, kiuj plenumos vian imagon de dezirata ferio.
Sufiĉas nur elekti inter la multaj vojaĝceloj en la nacia turisma retpaĝaro ĉe

www.slovakia.travel



Košice



# Bratislavo

Perlo de Danubo: tio estas nur unu el la kromnomoj donataj al la ĉefurbo Bratislavo. La urbo etendiĝas laŭ la bazo de la montaro Malé Karpaty (Malgrandaj Karpatoj), ambaŭflanke de la plej longa rivero en Eŭropo, Dunaj (Danubo). Bratislavo estas unu el la plej junaj ĉefurboj en la mondo, sed ĝia historio estis kronikata jam antaŭ du mil jaroj.
Vizitantojn allogas la intimeco de tiu relative malgranda urbo, kiu pulsas per vivo kaj kulturo malgraŭ — aŭ pro — sia grandeco. La plej alloga parto de la urbo certe estas la parto Staré Mesto,






kie vi povas vagi en la mallarĝaj stratoj kaj admiri impresajn historiajn monumentojn. La plej vizitataj kaj popularaj lokoj en la urbo estas ĝiaj ĉefaj monumentoj, nome la burgo Bratislavský hrad, la Katedralo de Sankta Marteno (Dóm svätého Martina), Primaspalaco (Primaciálny palác), la Pordego de Sankta Mikaelo (Michalská brána), la Malnova Urbodomo (Stará radnica), la Palaco de Grasalkovič (Grasalkovičov palác) kaj Palaco de Mirbach (Mirbachov palác), kaj la milita memorejo Slavín. La urbocentro plenas de belegaj kaŝitaj lokoj, sennombraj komfor-






taj kafejoj kaj bonegaj restoracioj kun riĉa kuirarta sperto. Kiel moderna metropolo Bratislavo havas vastan elekteblon de ĉiaspecaj loĝejoj, eĉ por la plej postulemaj gastoj kiuj kutimas je la plej alta okcidenteŭropa nivelo. Tutjare okazas en la urbo multaj diversaj kulturaj, sportaj kaj kuirartaj eventoj, kiuj kompletigas la memorindan etoson de tiu pitoreska urbo. La Krona Festo (Korunovačné slávnosti), la Bratislava Muzikfesto (Bratislavské hudobné slávnosti) kaj la Kristnaska Bazaro (Vianočné trhy) estas nur kelkaj menciindaj ekzemploj.
Ankaŭ la ĉirkaŭaĵoj de la urbo ofertas vastan aron da manieroj kiel pasigi liberan tempon. Ĝuu boatpromenon laŭ Danubo al la proksimaj ruinoj de la burgo Devín, gustumu fajnajn lokajn vinojn kaj kuirartajn specialaĵojn de la regiono de la Malgrandaj Karpatoj, biciklu laŭ iu ajn el la facilaj biciklaj vojoj laŭ Danubo, aŭ vizitu la ĉarman burgon Červený Kameň. Tio estas nur eta superrigardo de multaj aferoj, pri kiuj vizitantoj povas antaŭĝoji en ĉi tiu regiono, tiom riĉa je historio.



## Rekomendoj

- Kristnaska Bazaro (Vianočné trhy)
- Bratislava Maratono (Bratislava Marathon)
- Festivalo de Slovaka Manĝaĵo (Slovak Food Festival)
- Frandemula Festo (Gurmán Fest Bratislava)
- Kultura Somero (Kultúrne leto) kaj Bratislava Burga Festivalo (Hradné slávnosti Bratislava)
- Viva Musica!
- Somera Shakespeare-Festivalo (Letné shakespearovské slávnosti)
- Festivalo de Historiaj Skermo, Muziko, Danco kaj Metioj (Festival historického šermu, hudby, tanca a remesiel), la burgo Devín
- ÚĽUV Metiistaj Tagoj (Dni majstrov ÚĽUV)
- Vinberkolekta Festo (Vinobranie)

www.visit.bratislava.sk


Košice

# Kultura heredaĵo

Ideala pozicio en la koro de Eŭropo, riĉa plurmiljara historio kaj influo de najbaraj nacioj donis al Slovakio riĉan kulturan heredaĵon: keltajn setlejojn, romiajn fortikaĵojn, malnovslavajn religiajn lokojn, kastelojn kaj burgojn de hungaraj nobeluloj, mezepokajn minejojn, Renesancajn kaj barokajn palacojn, grek-katolikajn kaj ortodoksajn lignajn preĝejojn, judajn sinagogojn kaj tombejojn, intermilitan funkciismon kaj socialisman realismon de kreskantaj urboj, kaj ankaŭ modernajn verkojn spegulantajn la lastajn modojn.
Spuroj de slovaka historio kondukas al urboj, kie enirpordegoj, larĝaj remparoj, gardoturoj kaj konservita mezepoka arkitekturo atestas malproksiman pasintecon. La plej malnova reĝa libera urbo, kiu dum jarcentoj estis la ĉefa eklezia centro de la iama Hungaria reĝlando, estas Trnava, ankaŭ nomata "Malgranda Romo" pro siaj multaj belaj preĝejoj. Rara historia riĉeco malkovreblas en 18 heredaĵaj protektataj areoj, kiuj kreas neforgeseblan etoson per sia beleco, inkluzive de Bratislavo, la urboj Trenčín, Žilina, Nitra kaj urbo en centra Slovakio, Banská Bystrica. En Košice troviĝas la plej orienta okcidentstila gotika katedralo, la Katedralo de Sankta Elizabeto (Dóm sv. Alžbety), kiu estas la plej granda preĝejo en Slovakio. Košice plie estas la Eŭropa ĉefurbo de kulturo de la jaro 2013. Impona vido al la urbeto Spišská Nová Ves kaj ĝia ĉirkaŭaĵo atendas vin de la turo de la Preĝejo de la Ĉielenpreno de Maria (Kostol nanebovzatia Panny Márie), la plej alta en Slovakio kaj kun plej multe da horloĝoj.
Vizito al slovaka muzeo aŭ galerio promesas multajn rarajn trezorojn, de antikvaj arkeologiaj esplorejoj ĝis pop-arto en la Muzeo Andy Warhol pri Moderna Arto (Múzeum moderného umenia Andy Warhola) en Medzilaborce, la sola tiuspeca en Eŭropo, kaj la verkojn de nuntempaj artistoj. La kvar slovakaj reĝurboj Kežmarok, Stará Ľubovňa, Bardejov kaj Levoča prezentas sian komunan pasintecon kaj gloron de mezepoka reviviĝo. Ĉiu gastigas sennombrajn kulturajn kaj historiajn monumentojn kaj estas ideala vojaĝcelo de familia ferio por ekkoni la historion kaj etoson de Mezepoko.


Kežmarok


Levoča


Bardejov



Spišská Nová Ves



Červený Kameň

# Trezoroj de la pasinteco

Majestaj juveloj imponas fone de ravaj naturaj pejzaĝoj kaŝantaj la sekretojn de antikva pasinteco. Kasteloj, burgoj kaj iliaj ruinoj estas partoj de slovaka historio ekde nememorebla tempo. Tiuj iamaj fortikaĵoj de famaj nobeluloj, kiuj rezistis malamikajn atakojn kaj ĉeestis gravajn historiajn eventojn, daŭre havas etoson de gloro, eleganteco kaj romantiko. La diversaj arkitekturaj kaj artaj stiloj spegulantaj variajn historiajn epokojn garantias al vizitantoj memorindan travivaĵon. Ĉiu havas siajn mitajn rakontojn kaj legendojn.

Unu el la plej belaj kaj bone konservitaj burgoj estas nur kelkdek kilometrojn for de Bratislava: la burgo Červený Kameň, kiu estas ankaŭ populara filmloko pro sia neimitebla ĉarmo. La keloj de la kastelo estas la plej ampleksa subtera areo en Mez-Eŭropo. Amantoj de historio kaj nekuraceblaj romantikuloj sentos sin kiel en paradizo vidante la fabelan kastelon Bojnický zámok, kiu ĉiujare gastigas la Internacian festivalon de fantomoj kaj spiritoj, kiam la kastelo fariĝas renkontiĝejo por ĉiaj demonoj, sorĉistoj kaj vampiroj de la tuta mondo. En la burgo Oravský hrad, la plej vizitata slovaka monumento sidanta sur roko super la rivero Orava, oni filmis la unuan Drakulo-filmon, *Nosferatu.* La impona kastelo Betliarsky kaštieľ, tipa ĉasista domo en anglastila tereno kun artefarita groto kaj akvofalo, ĉarmos la vizitantojn per sia imperia interno kaj ampleksa biblioteko.

Vi povas sorbi la unikan etoson de kasteloj, burgoj kaj domegoj dum noktaj vizitoj kaj aliaj regule organizataj eventoj. Multaj el tiuj sorĉaj lokoj ofertas gastejon kaj plenan servon por geedziĝfestoj kaj aliaj privataj eventoj.




Oravský hrad


Vlkolínec

# Monumentoj de Unesko

La unikeco de la plej valoraj trezoroj de la slovaka historio certigis al ili lokon en la listo de la monda heredaĵo de Unesko. En 1993 tri lokoj en Slovakio enlistiĝis: la burgo Spišský hrad kaj ĉirkaŭaĵoj, Banská Štiavnica kaj Vlkolínec. Aldoniĝis en 2000 la historia urbo Bardejov en la regiono Šariš, en 2008 la lignaj preĝejoj en slovakia parto de la montaro Karpaty (Karpatoj), kaj la unika komplekso de monumentoj en la regiono Spiš pligrandiĝis per enlistigo de la urbo Levoča en 2009. Vlkolínec, la plej bone konservita rezervejo de popola arkitekturo en Slovakio, kun karakterizaj originalaj lignaj konstruaĵoj, estas ĉirkaŭata de la belega naturo de la regiono Liptov kaj donas al vizitantoj ŝancon senti la magion de mirindaj tradicioj kaj neripetebla historio. Banská Štiavnica, situanta en la centro de iama vulkano en la montaro Štiavnické vrchy, estas magia kaj mistika logo, kiu per intima kaj


Levoča


Bardejov


Banská Štiavnica


Spišský hrad


Levoča


Hervartov


Hervartov

familieca etoso allogas vizitantojn, kiuj volas fuĝi de la bruo de urbegoj. Distinga ortangula ĉefplaco kun la impona Baziliko de Sankta Egidio (Bazilika sv. Egídia) troveblas en la plej gotika urbo de Slovakio, Bardejov. La regiono Spiš estas hejmo de sennombraj unikaj monumentoj, kies plej grava historia objekto sendube estas la burgo Spišský hrad, la plej granda komplekso de fortikaĵaj ruinoj en Mez-Eŭropo, kune kun siaj ĉirkaŭaĵoj. La plej alta ligna altaro en la mondo, farita el tilia ligno kaj 18,62 m alta, estas verko de la plej fama slovaka lignogravuristo kaj skulptisto Majstro Pavol el Levoča, kaj troviĝas en la Preĝejo de Sankta Jakobo (Chrám sv. Jakuba) en Levoča. Iuj el la plej interesaj kaj gravaj spegulaĵoj de la pasinteco de Slovakio estas videblaj ankaŭ en la religia arkitekturo. Aldone al elstaraj ekzemploj en urboj, vizitantojn ravos ankaŭ multaj pentrindaj lignaj preĝejoj, plejparte en kampara orienta Slovakio. La plej malnova estas la Preĝejo de Sankta Francisko el Asizo (Kostol sv. Františka z Assisi) en Hervartov, kiu havas impresajn gotikajn ikonojn kaj murajn freskojn. La bone konservita stato kaj unikeco de tiuj monumentoj ĉirkaŭataj de belega slovaka naturo certigas neforgeseblan sperton.




Svätý Kríž

# Monumentoj de popola arkitekturo

La vivo de niaj prapatroj, iliaj kreemo kaj arto estas prezentataj en Slovakio precipe en subĉielaj muzeoj, kun monumentaj rezervejoj de popola arkitekturo. Danke al tiuj eksterordinaraj ekspozicioj vi povas hodiaŭ vidi unikajn elementojn de tradiciaj popolaj konstrumetodoj kaj popola kulturo. Ili ilustras, kiel antaŭe aspektis loĝejoj de slovakoj. Tiuj arkitekturaj trezoroj estis faritaj per simplaj iloj, sed per nekredebla teknika precizeco, arta elpensemo kaj efikeco. La vizitantojn fascinos nekutimaj strukturoj el arbotrunkoj, lignaj preĝejoj konstruitaj sennajle, domoj eltranĉitaj el roko kaj eksterordinaraj subteraj koridoroj. Vera raraĵo inter monumentaj rezervoj de popola arkitekturo estas la ĉarma vilaĝo Vlkolínec. La unikstila vilaĝo Čičmany ravos vin per siaj fabelaj lignaj domoj kun distingaj blankaj ornamaĵoj, same kiel la historia urbeto Banská Štiavnica per sia subĉiela muzeo pri minado. La Muzeo pri la Slovaka Vilaĝo (Múzeum slovenskej dediny) en Martin, donan-



Čičmany



Pribylina



Zuberec



Pribylina

ta superrigardon al tradiciaj konstruado kaj loĝado, estas la plej granda tia etnografia ekspozicio. Vizitante Slovakion ne forgesu viziti la Muzeon pri Vilaĝo de Orava (Múzeum oravskej dediny) en Zuberec, la Muzeon pri Vilaĝo de Liptov (Múzeum liptovskej dediny) en Pribylina, la Muzeon pri Vilaĝo de Kysuce (Múzeum kysuckej dediny) en Vychylovka, la Muzeon pri Šariš (Šarišské múzeum) en Bardejov kaj la Muzeon de Vihorlat (Vihorlatské múzeum) en Humenné. Ĉiu regiono povas fieri pri siaj trezoroj de popola tradicio. Lokoj kun popola arkitekturo estas idealaj por tuttaga ekskurso aŭ por pliriĉigi vian ferion en Slovakio.



## Rekomendoj

- kunveno de akordionistoj Heligónka aŭ festivalo de fujaristoj en Čičmany
- festivalo Turčianske folklórne slávnosti, muzeo Múzeum slovenskej dediny en Martin
- festivalo Podroháčske folklórne slávnosti, muzeo Múzeum oravskej dediny en Zuberec
- evento Nedeľa sv. Huberta, muzeo Múzeum liptovskej dediny en Pribylina
- nokto en la subĉiela muzeo Skanzen Bardejovské Kúpele



# Nekutimaj popolaj tradicioj kaj folkloro

Ekde nememorebla tempo homoj en Slovakio vivis harmonie kun la naturo, kun respekto kaj humileco al siaj antaŭuloj, kutimoj kaj tradicioj, de kiuj evoluis vivmaniero, popola kulturo kaj folkloro. Multaj unikaj tradiciaj kutimoj estis konservitaj, ĉu kiel popola arkitekturo, kantoj aŭ dancoj, apartaj kutimoj, ĉu kiel tradiciaj artoj kaj metioj.

Ekzemploj de kapabloj kaj artemo de la slovaka nacio estas plej bone sperteblaj en popolarkitekturaj rezervejoj, subĉielaj ekspozicioj, folkloraj kaj aliaj festivaloj, kaj en pli malgrandaj vilaĝoj ekzemple en Kysuce, Orava, Liptov, Horehronie, Spiš kaj Šariš. Vizitantoj povas admiri la unikan trunkan arkitekturon en heredaĵkonservaj rezervejoj en Osturňa, Ždiar kaj Podbieľ, ŝtonloĝejojn en Brhlovce kaj la tipajn vinfarajn konstruaĵojn Stará Hora ĉe Sebechleby.

Vera kaj eksterordinara tradicia etoso estas spertebla en iu ajn el la buntaj folkloraj festivaloj kaj festoj en Hrušov, Zuberec kaj Heľpa.

Folklora muziko plena je neimiteblaj sonoj de fujaro, zimbalono kaj akordiono dancigos ĉiujn. La unika sono de fujaro, nekutima muzikilo kun melankolia tono, estis aldonita al la listo de la parola kaj nemateria monda heredaĵo de Unesko.

Folkloraj eventoj estas ankaŭ unika





Brhlovce





ŝanco vidi tradiciajn artojn kaj metiojn, kiel dratumadon, ŝnurfaradon, korbofaradon kaj potfaradon. Inter la plej bonaj eventoj por vidi verkadon de majstroj de tradiciaj metioj kaj rekte observi, kiel ili aplikas sian scipovon, estas la Eŭropa popolmetia festivalo Európske ľudové remeslo, okazanta la duan semajnon de julio en Kežmarok.

Unikan lokon en slovaka kulturo havas lokaj variaĵoj de la tradicia kostumo nomata *kroj*, kiuj ankoraŭ hodiaŭ fascinas per sia diverseco, buntaj koloroj kaj arta farado. Multaj slovakaj popolaj tradicioj kaj kutimoj vivas ĝis hodiaŭ,







kaj ĉiujare ili reviviĝas ĉie en Slovakio. Komence de la jaro okazas tipa karnavalo nomata *fašiangy*, tempo de ĝojo kaj festado, dum kiu eblas vidi buntan karnavalan procesion kun multaj originalaj maskoj. Pasko ne estus Pasko sen la tradicia vipado kaj akvoŝprucado de knabinoj, *šibačka*. Somere oni bruligas fajrojn de sankta Johano, kaj Kristnasko komprenéble troviĝas inter la plej magiaj kaj riĉaj festoj en Slovakio.



# Fascina naturo

Kun sia diverseco slovaka naturo fascinas ĉiun vizitanton, kiu venas ĉi tien kaj malkovras ĝiajn unikajn kaj imponajn lokojn. Ĝi ne nur havas la plej malgrandan montaron en la mondo, la plej vastan karstan areon en Mez-Eŭropo kaj praarbarojn, sed ofertas ankaŭ ĉiajn fascinajn kaj specialajn travivaĵojn per vizito de iu ajn el naŭ naciaj parkoj de la lando. La simboloj de la plej malnova, la nacia parko Tatranský národný park, klasifikita de Unesko kiel biosfera rezervejo ekde 1993, estas la bela montara floro edelvejso kaj unu el la plej maloftaj endemiaj bestoj, ĉamo. Alloga aro da altebenaĵoj, valetoj kaj akvofaloj estas protektata de la nacia parko Národný park Slovenský raj. La sovaĝa montaro de la nacia parko Národný park Muránska planina, kiu havas grandan aron da protektataj kreskaĵoj kaj bestoj, estas vizitebla surdorse de speciala ĉevala raso nomita Hucul. La plej granda karsta areo en Mez-Eŭropo estas la nacia parko Národný park Slovenský kras, kun pli ol 1000 grotoj kaj abismoj, inkluzive de kelkaj Unesko-agnoskitaj. La vizitantoj povas ĝui belegan naturan pejzaĝon de la plej malgranda parko flosante laŭ la rivero Dujanec, kiu konsistigas la pol-slovakan landlimon. Tipa trajto de la nacia parko Národný park Poloniny en orienta Slovakio estas la unikaj montokrestaj herbejoj nomitaj *poloniny*, de kie devenas ĝia nomo. Tie oni trovas ankaŭ eksterordinarajn Unesko-agnoskitajn Karpatajn betulajn praarbarojn. Interesa loko estas la "malhelĉiela parko" en Poloniny, kiu estas la plej malluma loko en Slovakio rilate al lumpoluo.
La kuraca trankvileco kaj sorĉa etoso de romantikaj lokoj neĝenataj de urba svarmado daŭre ofertas veran fuĝon de la zorgoj de la ĉiutaga vivo, kaj donas al naturŝatantoj perfektan manieron por ripozi kaj refortiĝi.


Veľká Fatra kaj Malá Fatra




Roháčsky vodopád




Dobšinská ľadová jaskyňa

# Subteraj trezoroj

Malmultaj landoj estas tiom benitaj per tiom granda kvanto da diversaj subteraj karstaj formaĵoj kiel Slovakio. Estas konataj 6 200 grotoj, el kiuj ok estas viziteblaj. Ili inkluzivas la plej gravajn kaj altvalorajn Unesko-agnoskitajn grotojn de Slovenský kras kaj la groton Dobšinská ľadová jaskyňa.
Aparte valora estas la aragonita groto Ochtinská aragonitová jaskyňa, la sola tiuspeca en Eŭropo. Ĝiaj subteraj ĉambroj estas ornamitaj per aragonitaj kristaloj, kelkloke en formo de delikata koralo kaj neĝblankaj arbustetoj. En Domica troveblas la plej granda konata groto de Slovenský kras, kie vi povas boatumi laŭ la rivero Styx. Slovakaj grotoj donas al vizitantoj ŝancon sperti ion neordinaran kaj malkovri trezorojn de la mistera karsta subtera mondo.



Ochtinská aragonitová jaskyňa



Demänovská jaskyňa slobody

## Grotoj malfermitaj al la publiko

Belianska jaskyňa
Bystrianska jaskyňa
Demänovská jaskyňa slobody
Demänovská ľadová jaskyňa
Dobšinská ľadová jaskyňa
Jaskyňa Domica
Jaskyňa Driny
Gombasecká jaskyňa
Harmanecká jaskyňa
Jasovská jaskyňa
Ochtinská aragonitová jaskyňa
Važecká jaskyňa

## Grotoj kun limigita aliro

Bojnická hradná jaskyňa
Jaskyňa mŕtvych netopierov
Jaskyňa Zlá diera
Krásnohorská jaskyňa
Malá Stanišovská jaskyňa
Prepoštská jaskyňa



Štrbské pleso – Vysoké Tatry

# Ripozu kaj amuziĝu en akvo



Váh

Oni povus diri, ke akvo estas la plej granda trezoro de Slovakio. La lando enhavas kelkajn el la plej ampleksaj rezervoj de freŝa trinkakvo en la mondo. Tion ĝi plejparte ŝuldas al la plej granda riverinsulo en Eŭropo, Žitný ostrov, en la sudo de la lando. Akvo ne nur vigligas vivon, en Slovakio ĝi ankaŭ ebligas amuziĝon kaj agrablan ripozadon.

La beleco de sovaĝaj montaraj riveretoj kaj kristalaj lagoj benos vian restadon en montaro; dum banado en naturaj lagoj, baraĵlagoj, riveroj kaj basenoj refreŝigos vin en varmegaj someraj tagoj. Bona programo estas interalie sporta flosado sur la rivero Dunajec, aŭ sur la riveroj Váh kaj Orava per lignaj flosoj, ofte kune kun speciala programo kaj gustumado de lokaj kuirartaj specialaĵoj. Flosado de rapidrivero estas sensacia sperto ankaŭ sur la riveroj Belá, Dunajec kaj Hron.

Modernaj sanigaj basenoj kaj akvoparkoj donas oazon de malstreĉiĝo ne nur somere, sed ankaŭ vintre, kiam banado sub neĝkovritaj montoj estas vere eksterordinara sperto. Akvaj areoj ofertas ankaŭ multajn eblojn por sportumado kaj gastigas multajn kulturajn kaj sportajn eventojn somere.



Belá


Rajecké Teplice

# Sano el la naturo


Slovakio estas lando benita de subtera riĉeco, ĉar la kuraca povo kaj favoraj efikoj al la homa organismo supreniras kaj ŝprucas el mineralaj fontoj. Danke al sia saniga povo kuraci malsanojn kaj revivigi sanon ili estis konsiderataj miraklaj kaj rimarkindaj ekde nememorebla tempo. Sanigaj banejoj en Slovakio troviĝas inter la plej malnovaj kaj kvalitaj en Mez-Eŭropo. La plej konata banurbo estas Piešťany, kiu iĝis fama ne nur pro siaj unikaj sanigaj mineralaj akvoj, sed ankaŭ por sia kuraca sulfura ŝlimo. Rajecké Teplice ĉarmas ĉiujn vizitantojn per sia


Piešťany

aparta antikva etoso, dum la banejo en Turčianske Teplice dorlotos vin per sia unika procedo, la Ora kuraco. Du pliaj banejoj estas unikaj en Eŭropo. En Sklené Teplice estas grota vaporbaseno nomita Parenica; en Trenčianske Teplice estas turka banejo. La nekutime pura aero de la montaro Vysoké Tatry (Altaj Tatroj), en kiu estas pluraj klimataj banejoj, helpas kuraci spirajn malsanojn ĉe plenkreskuloj kaj infanoj.
La unika etoso de slovakiaj banurboj estas pliriĉigita de siaj allogaj ĉirkaŭaĵoj kaj oportunoj por aktiva libertempo kaj kulturaj travivaĵoj.


Sklené Teplice


Trenčianske Teplice


Piešťany





Nízke Tatry

# Bicikle tra Slovakio



Nízke Tatry



En la sino de slovakia naturo, kiu ofertas riĉan aron da fascinaj spertoj, ŝatantoj de aktiva kaj sana ripozo povas admiri senspirigajn rokajn masivojn, kanjonojn kaj abismojn, magiajn montajn valojn, mirindajn mondgravajn grotojn, serpentajn riveretojn kaj viglajn akvofalojn, rarajn bestojn kaj kreskaĵojn kaj multe pli, sidante sur unu el la plej ekologiaj veturiloj, biciklo.
Aldone al la miriga natura beleco biciklantoj en Slovakio malkovros ĉiajn unikajn heredaĵojn kiel mezepokajn urbojn, romantikajn kastelojn, palacojn kaj ruinojn, glorajn domegojn kaj arkeologiajn trovaĵojn. Unu el la plej allogaj biciklaj vojoj estas la longdistanca vojo "Tra Slovakio per biciklo". Laŭvoje vizitantoj vidos multajn unikajn monumentojn kaj naturajn mirindaĵojn. La vojo kondukas de la danubaj plataĵoj, laŭ vinejoj de la Malgrandaj Karpatoj, tra la pitoreskaj regionoj Považie kaj Kysuce, al la montaraj regionoj Orava kaj Liptov, poste sube de montaroj Nízke Tatry (Malaltaj Tatroj) kaj la Altaj Tatroj ĝis Poprad, aŭ rekte al la nacia parko Národný park Slovenský raj. La ĉ. 750 km longa vojo konsistas el signitaj longdistancaj biciklaj vojoj, kiuj ofertas multajn oportunojn por malkovri specialajn lokojn de Slovakio de komforta seĝo de via biciklo kaj uzante regionajn biciklajn vojojn.
Adrenalinemuloj povas provi supreniradon en biciklaj parkoj de la Altaj Tatroj kaj la Malaltaj Tatroj, la valo Bachledova dolina, Malinô Brdo kaj Oščadnica.

## Tra Slovakio
(biciklaj vojoj)

Dunajská cyklistická cesta
Hornádska cyklomagistrála
Kysucká cyklomagistrála
Liptovská cyklomagistrála
Malokarpatská cyklomagistrála
Moravská cyklistická cesta
Oravská cyklomagistrála
Popradská cyklomagistrála
Vážska cyklomagistrála

www.vitajtecyklisti.sk



Chopok – Nízke Tatry

# Aktiva feriado



Piešťany



Vysoké Tatry



Vysoké Tatry

La natura medio de Slovakio ofertas al tiuj, kiuj ŝatas aktivajn feriojn, multajn manierojn por ĝui sian liberan tempon kaj sportumi. Ĉu montaraj ekskursoj, grimpado sur rokoj, ĉu adrenalinaj sportoj, ĉu ekscita amuziĝo sur akvo aŭ en aero, ĉiuj kiuj amas aktivecon, aventuron kaj aktivan malstreĉiĝon havos grandan elekton.

Vizitantoj povas malkovri la kaŝitajn juvelojn de slovakiaj regionoj en pli ol 14 000 km da signitaj promenaj vojoj, aŭ en pli ol 10 000 km da signitaj biciklaj vojoj. Admiru la impresajn kanjonojn, akvofalojn, riveretojn kaj rokojn de Slovenský raj, la unikajn ŝtonajn formaĵojn en Muránska planina kaj en Slovenský kras, Jánošíkove diery en la montaro Malá Fatra, praarbarojn en Poloniny, aŭ konkeru unu el la pintoj de la plej alta montaro en Slovakio, sed la plej malgranda en la mondo, la Altaj Tatroj, kun 25 pintoj super 2 500 m. Ĉiu pasia turisto ĝuos ankaŭ la ekscitajn spertojn de la plej bela kaj due plej alta montaro de Slovakio, la Malaltaj Tatroj, preskaŭ 100 km longa, aŭ de ekskurso en la bonegaj promenejoj en la montaroj Chočské vrchy, Strážovské vrchy aŭ Súľovské vrchy.

Ŝatantoj de adrenalinaj sportoj ĝuos la fascinajn pejzaĝojn de pentrinda Slovakio el aerbalono, deltaplano aŭ paraŝuto. Akvosportemuloj povas testi siajn kapablojn sur la rapidakvoj de Čunovo aŭ en Liptovský Mikuláš. Golfistoj plibonigos sian svingon, precizecon kaj paciencon en perfekte prizorgataj golfejoj en belaj ĉirkaŭaĵoj apud urboj kaj skiejoj.

Unu afero estas certa: ĉiuj ŝatantoj de aktiva feriado kaj sana vivstilo povos plenumi siajn dezirojn kaj revojn dum ferio en Slovakio.



# Paradizo de vintraj sportoj

Skiejoj por ĉiuj niveloj, mirigaj vojoj por ŝatantoj de neĝtabulado, majestaj montaj deklivoj por vintraj ekskursoj, kombine kun la pejzaĝo de neĝkovritaj pintoj, ĉio estas trovebla en slovakiaj montoj vintre. Ĉu en la Altaj Tatroj aŭ Malaltaj Tatroj, en Malá Fatra aŭ en Veľká Fatra, ĉie estas grandaj modernaj turismaj ejoj kaj ankaŭ pli malgrandaj ĉarmaj lokoj kun plaĉa etoso, idealaj por komencantoj, familioj kun infanoj kaj plezurskiantoj. Ski-alpinistoj povas testi siajn limojn sur malfacila vintra tereno, for de homplenaj skiejoj kaj ĉirkaŭitaj de montara silento, kie ili povas skii sur freŝa neĝo. Krom organizitaj ski-kuroj slovakiaj skiejoj havas ankaŭ tutlandajn vojojn, neĝtabulejojn, skilernejojn por junuloj kaj maljunuloj kaj pruntejojn por skia ekipaĵo. Se vi ne ŝatas skii, provu alian adrenalinan amuzaĵon, kiel neĝtubadon, kajto-tabuladon, toboganojn kaj sledadon aŭ glitkuradon. La plej multaj skiejoj havas ekipaĵon por artefarita neĝo kaj eblas tie skii vespere. La plej bonaj skiejoj havas ankaŭ restoraciojn, postskiajn trinkejojn kaj amuzaĵojn kun oftaj interesaj eventoj. Unu el la plej popularaj vintraj sportoj estas hunda sledado, ĉar Slovakio provizas perfektajn kondiĉojn por tiu sporto. La montara vilaĝo Turecká estas kutima loko por la vetkuroj Krňačkové preteky, kie vizitantoj povas rajdi sur tradicia ligna sledo kaj igi sledadon ekscita sperto.



Krňačky













# Interesaj eventoj

Vizitantoj en Slovakio havos multe da elekto inter regulaj sportaj, kulturaj kaj folkloraj eventoj, certigataj neforgeseblan etoson.
Ĉiujare la ĉefurbo Bratislavo gastigas la Kronan Feston, kiu bildigas vivon dum Mezepoko kun reĝoj kaj reĝinoj, nobeluloj, trobadoroj kaj miloj da spektantoj. Por aŭdi elstarajn muzikajn komponaĵojn, kaj slovakajn kaj eksterlandajn, la plej bona elekto estas la prestiĝa internacia Bratislava Muzikfesto (BHS). Koncerne subĉielajn somerajn muzikfestivalojn, la festivalo Bažant Pohoda en Trenčín estas la plej granda en Slovakio. Artfilma festo en Trenčianske Teplice apartenas al la plej gravaj filmaj eventoj en Mezeŭropo. Por vidi popolajn muzikon kaj kutimojn de unuopaj regionoj iru al iu ajn el la multaj folkloraj festivaloj. La plej grandaj el ili okazas en Východná, Myjava, Terchová kaj Detva, kie vi ensaltos en tradician popolarton kaj folkloron. Supernatura etoso kaj amuziĝo estos garantiitaj, se vi iros al internacia festivalo de fantomoj kaj spiritoj en la plej pentrinda kastelo de Slovakio, Bojnice. Se vi preferas humuron kaj satiron de la plej bonaj dramaj, kabaredaj kaj muzikaj prezentaĵoj de Slovakio kaj eksterlando, la unika festivalo Kremnické gagy estas por vi. Metiistaj tagoj organizataj de ÚĽUV en Bratislavo estas unu el la plej gravaj eventoj en Slovakio pri tradiciaj artoj kaj metioj. Elstaraj metiistoj elmontras siajn tradiciajn artajn kapablojn rekte surloke kaj vizitantoj povas aĉeti iliajn manfaritajn varojn. Se vi estas teatrema, nepre iru al la Kastelaj Ludoj en Zvolen (Zámocké hry zvolenské), kiuj okazas en la unika medio de la historia korto de la kastelo. Koncerne regulajn gravajn sportajn eventojn en Slovakio, unu el la plej elstaraj estas la Internacia Maratono por Paco (Medzinárodný maratón mieru), kiu okazadas en Košice ekde 1924 kaj pro tio estas la plej malnova maratono en Eŭropo.












# La tradicia gusto de Slovakio

Slovakio ne nur havas riĉan aron da kulturaj allogaĵoj, historiaj monumentoj kaj sportaj kaj sociaj ebloj; ĝi ankaŭ kapablas kontentigi la plej postuleman frandemulon. La tradicia slovaka kuirarto plaĉos precipe al ŝatantoj de fromaĝo kaj laktaĵoj. La plej tipa slovaka nacia plado estas *bryndzové halušky so slaninou* (terpomaj pastaĵoj kun ŝafa fromaĝo kaj lardo), al kiu vi povas aldoni gravuritan lignan tason da densa lakto *žinčica* (fermentigita ŝafa lakto simila al kefiro). Multaj aliaj slovakaj manĝaĵoj estas kompreneble provindaj, ekzemple pano kun porka ŝmalco kaj cepo, hejmfaritaj fumaĵitaj kaj nefumaĵitaj fromaĝoj ktp. Vizitantoj provu ankaŭ tipan fazeolan aŭ ajlan supon servitan en bovlo farita el granda bulko nomita *bosniak*, aŭ la daŭre popularan acidbrasikan supon kun fumaĵita viando, kolbaso kaj fungoj. Por fini pli dolĉe gustumu la unuan slovakan produkton kun protektita deveno, la kukon *trdelník* de Skalica. Bonega gastronomia sperto atendas vin dum la ansera festeno, plej ofte festata en la vilaĝo Slovenský Grob. Frandu bongustajn slovakajn specialaĵojn en la tipa etoso de ligna kabano *koliba* aŭ *salaš*, ideala loko por kombini kuirartan sperton kun ĉarma ĉirkaŭaĵo. Kvalita manĝaĵo estas servata ne nur en tiaj tradiciaj manĝejoj, kiuj ofertas bonegajn regionajn specialaĵojn, sed ankaŭ kompreneble en modernaj unuaklasaj restoracioj. Kulinaran festenon akompanas fajna slovaka vino el iu ajn el la slovakaj vinregionoj, de Tokaj en orienta Slovakio ĝis la vinprodukta regiono de la Malgrandaj Karpatoj okcidente.





## Gastronomiaj rekomendoj

- Slovak food festival Bratislava
- Grilliada Banská Bystrica
- Gurmán Fest Bratislava
- Gurmán Fest Košice
- Trdlofest Skalica
- monda ĉampionado pri kuirado kaj manĝado de bryndzové halušky in Turecká kaj Terchová

## Vinaj vojoj

Malokarpatská vínna cesta
Nitrianska kráľovská vínna cesta
Tokajská vínna cesta
Hontianska vínna cesta
Požitavská vínna cesta
Vínna cesta Záhori

# Slovaka turisma agentejo

## Ĉefa oficejo

**Slovenská agentúra**
**pre cestovný ruch**
(Slovak Tourist Board)
Dr. V. Clementisa 10
821 02 Bratislava
Slovenská republika
Tel.: +421 2 50 700 801
Fax: +421 2 55 571 654
Retpoŝto: sacrba@sacr.sk
www.sacr.sk, www.slovakia.travel

## Oficejo en Banská Bystrica

**Slovenská agentúra**
**pre cestovný ruch**
Námestie Ľ. Štúra 1, P. O. Box 35
974 05 Banská Bystrica
Slovenská republika
Tel.: +421 48 413 61 46
Retpoŝto: sacr@sacr.sk

## Eksterlandaj oficejoj

**Ĉeĥio**
Slovenská agentura
pro cestovní ruch
Jilská 16
110 00 Praha 1
Česká republika
Tel.: +420 224 946 082
Poŝtel.: +420 776 765 477
Retpoŝto: office.cz@slovakia.travel

**Hungario**
Szlovák Idegenforgalmi Hivatal
Rákoczi út 15
H 1088 Budapest
Magyarország
Tel.: +36 1 429 00 49
Poŝtel.: +36 30 434 13 68
Retpoŝto: office.hu@slovakia.travel

**Germanio**
Slowakische Zentrale für Tourismus
Hildebrandstr. 25
D - 10785 Berlin
Deutschland
Tel.: +49 30 259 426 40
Fax: +49 30 259 426 41
Retpoŝto: office.de@slovakia.travel

**Pollando**
Narodowe Centrum Turystyki
Słowackiej
ul. Krakowskie Przedmieście 47/51
00-071 Warszawa
Polska
Tel.: +48 22 827 00 09
Poŝtel.: +48 606 236 044
Retpoŝto: office.pl@slovakia.travel

**Aŭstrio**
Slowakische Zentrale für Tourismus
Opernring 1 / R / 507
A - 1010 Wien
Österreich
Tel.: +43 1 513 95 69
Poŝtel.: +43 650 911 40 90
Retpoŝto: office.at@slovakia.travel

**Rusio**
Predstaviteľstvo Slovackovo
Upravlenija po Turizmu
Posolstvo Slovackoj Respubliky
Ul. J. Fučíka 17-19, 123 056 Moskva
Rossijskaja Federacija
Tel.: +7 499 251 76 31
Retpoŝto: office.ru@slovakia.travel



**Eldonita:** 07/2015
**Aŭtoro:** Slovenská agentúra pre cestovný ruch
**Teksto:** Slovenská agentúra pre cestovný ruch
**Bildoj:** arkivo de SACR, L. Struhár, B. Schreiber, M. Črep, A. Jiroušek, M. Eliáš, R. Buga, TMR, SPA Piešťany, SPA Turčianske Teplice, D. Bugár, A. Vojček, Bratislava, M. Dibák
**Dizajno kaj presado:** Slovenská Grafia, a.s., Bratislava
**Kunordiganto de la projekto:** Cortes, Smith & Co. Slovakia, s.r.o., Bratislava
**Traduko:** Matthieu Desplantes

Eŭropa Unio

Ĉi tiu materialo estis kunfinancata de la Eŭropa Unio per la operacia programo Konkurkapablo kaj Ekonomia Kreskado.




Eŭropa Unio

OPERAČNÝ PROGRAM
KONKURENCIESCHOPNOSŤ
A HOSPODÁRSKY RAST

Ĉi tiu projekto estas kunfinancata de la Eŭropa
Fonduso de Regiona Evoluo.


Ĉi tiu broŝuro estas nevendebla.